

Jean Esperanto Info

Magazine de l'association Espéranto-Jeunes : JEFO-Informas
Trimestriel • n°2007/3 • 2 €

amikumu.com

klaku.net

netvibes.com

eklaboru.com

**Speciala
numero:**

Interretaĵoj

cantr.net

Enhavo / Sommaire

Édito, Mot du président **p. 3**

En la mondo / raportoj

Vojaĝo en Vjetnamio,
kie okazis la 63-a IJK **p. 4**
Strasburgaj gestudentoj
povos lerni Esperanton! **p. 5**
Universala Kongreso 2007 **p. 6**
Sen Programa Renkontiĝo **p. 8**

Distre kaj kulture

Literaturo: « Memvola ŝippereulo »,
«La longa marŝado » **p. 18**
Kore, «Tielas vivo» **p. 25**

Speciala numero: Interretaĵoj

Eklaboru, Amikumu **p. 11**
Netvibo, remiksu la reton **p. 12**
Cantr II: rolludu en Esperanto! **p. 14**
Nouveau projet : une émission en
balladodiffusion **p. 16**
La Ponto – kuntraduku filmojn! **p. 17**

En Francio / Vie de l'association

C.A. du 6 octobre **p. 20**
Le suffixe -iĉ- **p. 23**
Komitatanoj, kiuj vi estas? **p. 24**

Le Petit Spirou en espéranto !

Qui ne se reconnaît pas dans le Petit Spirou ?

À l'instar de Titeuf ou du Petit Nicolas, il décrit sa vision du monde des adultes à travers sa perception d'enfant, pleine d'humour et de naïveté.

Enfants, parents et grands-parents le retrouveront avec plaisir dans sa première aventure en espéranto.

Commandez le à :

Espéranto-jeunes
4 bis, rue de la Cerisaie
75004 Paris

tél. : 01 42 78 68 86

<http://esperanto-jeunes.org/spirou>

Exemplaires	Tarif (€)	Tarif + port
1	9	11,50
3	18	21,60
5	30	36,00
10	60	67,50



Édito

Voici le quatrième et dernier numéro du *JeunEsperanto Infos* pour lequel j'ai travaillé en tant que rédacteur en chef. J'espère que celui-ci vous plaira autant que les trois autres. Après ce numéro, Vincent Pacheu va reprendre le flambeau pour accomplir la difficile tâche de s'occuper de notre revue. N'hésitez pas à lui écrire à l'adresse suivante : ahirom4@hotmail.com pour lui proposer des articles ou des illustrations. J'ai pris beaucoup de plaisir à m'occuper de la rédaction de notre revue et je suis sûr que j'en prendrai autant à lire les numéros suivants.

Ce numéro a pour thème les différents sites Internet liés à l'espéranto. Aujourd'hui, il est quasiment impossible de passer à côté d'Internet pour se former ou s'informer, de nouveaux sites apparaissent régulièrement et certains sites très connus proposent souvent une version en espéranto. On pense tout naturellement à Google, Netvibes ou à Wikipédia.

Mais les espérantophones ne font pas que traduire, ils sont aussi

créateurs de site. L'association Espéranto-Jeunes a rénové il y a peu de temps son site Internet, et propose aussi d'autres sites annexes tout aussi importants, comme par exemple le site d'apprentissage, accessible sur <http://ikurso.esperanto-jeunes.org> qui va fêter ses six bougies le mois prochain, aura vu passer plus de 2 800 élèves qui se sont inscrits pour découvrir les rudiments de l'espéranto. À cette occasion, nous publions dans ce numéro quelques commentaires enregistrés à l'inscription par différents élèves. Nous verrons également que l'espéranto peut être utilisé sur Internet pour trouver du travail grâce au site *eklaboru* qui permet de mettre en relations commerciales des espérantistes.

Et après l'effort, le réconfort, nous découvrirons le site *amikumu* qui permet de s'amuser et se faire des ami-e-s à travers le monde. Et quand il s'agit de s'amuser, Christophe sait s'y faire, il nous fera découvrir un site de jeu en ligne où il est possible de discuter en espéranto avec d'autres joueurs. Fabien de son côté nous fait découvrir le principe des baladodiffusions (également connu sous le nom de Podcast chez les

amis de Shakespeare) ainsi que le RSS dont nous avons déjà parlé dans nos pages en présentant le site Netvibes.

Ce numéro est aussi l'occasion de faire le bilan des différentes rencontres qui ont eu lieu cet été, notamment avec les aventures de notre ami Aleks au pays du soleil levant. Véronique a également profité de la beauté de l'Asie lors du congrès mondial des Jeunes Espérantophones au Vietnam. Armelle et François nous racontent chacun comment ils ont vécu la rencontre en Catalogne SPR (Sen Programa Renkontiĝo).

Et pour finir, je vous invite à lire avec beaucoup d'attention le compte rendu du conseil d'administration de l'association car c'est à cette occasion que se sont décidés les projets qui vont être menés au cours de l'année. Et parmi tous les projets qui sont traités, l'un d'entre eux est particulièrement attendu... Je vous laisse jeter un coup d'œil au dos de la revue pour le découvrir.

Bonne lecture et à bientôt,

Axel Rousseau

Le mot du président

Course de dernière minute pour ce JI !

Je suis persuadé que notre redac'chef le rappellera dans son édit : il faut contribuer. Nous avons semble-t-il frôlé un JI de 10 pages... Quelle aurait été votre déception en recevant si peu !

Heureusement, la réunion du conseil d'administration est arrivée à point et cela nous a permis de consacrer un peu de temps à l'écriture d'articles. Vous pourrez lire dans ce numéro le compte rendu de cette réunion, mais je note ici le plus important : votre revue a un nouveau rédacteur. Il s'agit de Vincent Pacheu, il sera notamment aidé par Fabien Tschudy mais je l'espère aussi, par vous tous !

N'hésitez pas à contribuer à votre revue. Vincent communiquera, très rapidement je pense, les thèmes qu'il souhaite traiter dans les prochains numéros, mais rien ne vous empêche de contribuer par un article sans rapport avec le thème : un « recenzo », un jeu ou une illustration sont toujours les bienvenus.

Dernière chose et pas des moindres : un nouveau bureau a été élu, vous retrouverez sa composition dans le compte rendu.

Je remercie ainsi le « komitato » pour la confiance qu'il m'a à nouveau accordée.

François Parchemin





Vojaĝo en Vjetnamio, kie okazis la 63-a IJK

La lastan jaron, unuafoje, mi partoprenis en junularaj renkontoj (IJK 62-a = Internacia Junulara kONGRESO en Sarajevo, kaj IJS = Internacia Junulara Semajno en Hungario) kie mi multe amuziĝis. Dume, Hai Ly (prezidantino de IJK 63-a en Hanojo) prezentis sian landon kaj la venontan junularan kongreson. Tio multe plaĉis al mi kaj mi jam decidis partopreni en tiu evento.

Kiam ni alvenis, mi kun alia Francino, al Hanojo, tri gejunuloj atendis nin por gvidi nin ĝis la Hanoja centro, kie ni loĝos. Dum la tuta vojaĝo, preskaŭ unu horon, eta Vjetnamino (jes, eĉ por Vjetnamino ŝi estas malgranda!) babilis kun mi, senĉese havis novajn demandojn pri Francio, klarigis la vjetnamajn kutimojn, ktp. Tiel ni atingis nian hotelon tre rapide.

Alvenonte al la kongresejo (kie troviĝis ankaŭ la dormejo), ni renkontis kongresanon,

kiu rakontis al ni kiel estas la ĉambroj (li alvenis la antaŭan tagon): litoj sen matraco, nur ligna tabulo kaj bambua tapiŝo; evidente ne klimatizilo. La gejunuloj ne kontentis pro la prezo: en Hanojo ni havis matracon kaj klimatizilon en malpli kosta hotelo. Kelkaj homoj decidis loĝi en alia proksima loko, ekstere de la kongresejo. Tamen la gehelpantoj estis tre afablaj, agrablaj kaj ĝojaj kiam ili povis helpi nin, ĉiam ridetante.

En tiu renkonto, la okcidentanoj estis malpli multaj ol la orientanoj. Tiel mi renkontis: Nepalojn, Ĉinojn, Japanojn, Koreanojn, Aŭstralianojn kaj kompreneble Vjetnamojn. Tio multe plaĉas al mi.

La kongresprogramo estis ne tre interesa laŭ opinio:

- Unue estis malmulte da eblecoj, maksimume ni povis elekti

inter du malsimilaj programeroj;

- Due, pliofte la programeroj estis proponataj de maljunuloj do estis iomete tro intelektaj kaj ne sufiĉe ludaj;

- Trie, estis nur prelegoj, neniam estis dancoj, sportoj, ludoj, ktp. Plurfoje, vesperprogramo proponis dancojn, sed nur spektaklon, ne lernadon.




Tamen estis tre interesa prezentado pri Korea paca movado de Paz, kiu parolis pri sia lando montrante belajn fotojn.

La lasta programo finiĝis je la 23a30, kaj sur afiŝo estis skribite, ke ĉiuj kongresanoj devos esti en la kongresejo antaŭ la 23a pro la pordofermo. Feliĉe la gejunuloj ne iris dormi tiel frue. Do okazis ĉiunokte babilado, kantado, ludoj aŭ dancoj. Kelkaj maljunuloj ne ŝatis tion. Ekzemple, la lastan nokton, ni faris akvobatalon kaj kelkaj junuloj provis malsekigi Vjetnaminojn kiuj rifuĝis en sian ĉambro. Maljunulino eliris el sia ĉambro kaj skoldis la junulojn, kiuj amuziĝis. Ĉu ni estis en junulara kongreso aŭ ne?

Post la kongreso, kun kelkaj novaj amikoj, ni decidis viziti Vjetnamion. Unue la nordon, kie troviĝas montaro. Simpatia Vjetnamino konsentis akompani nin por helpi, traduki, kaj daŭri amuziĝi. Poste ni flugis ĝis Ho Chi Minh Urbo, kie esperantistoj akceptis nin tre bone, trovis bonan hotelon por ni, vizitigis la urbon al ni ktp. Ili estas tre feliĉaj kiam ili povas renkonti alilandanojn do ili estas tre oferemaj kaj simpatiaj.

Estis tre bela vojaĝo, kaj mi ĉiam memoros ĝin.

Véronique Bichon



Strasburgaj gestudentoj povos lerni Esperanton!

Kiel en multaj eŭropaj universitatoj, regas la angla kiel ĉeflernata lingvo en la universitatoj de Strasburgo (Francio), kun ankaŭ iom grava ĉeesto de la germana pro la proksimeco de la germana landlimo.

Por ebligi la strasburgajn gestudentojn plurlingvaniĝi, la 3 urbaj universitatoj antaŭ kelkaj jaroj kreis la lingvocentron SPIRAL, kie universitataj povas memstare kaj gvidataj de instruistoj lerni dudekon da lingvoj.

Post 4 jaroj da klopodado, lokaj esperantistoj finfine sukcesis enkonduki lerneblon de Esperanto en tiun lingvocentron. Eble helpis al enkonduko ke ĉi-jare la lingvocentro malfermiĝas emfazante lernadon de malplej parolataj lingvoj.

La unuaj gestudentoj povos eklerni esperanton ekde la 1a de oktobro, kiam la lingvocentro malfermiĝos. Kadre de memlernado en SPIRAL ne eblas akiri notojn, tial la studentaro vizitanta la lingvocentron estas sincere lingvolernema kaj ne laboras nur por poentoj.

La nura maniero por taksii sian nivelon estas uzi la komunan lingvan eŭropan referenckadron kaj valorigi siajn konojn kompletigante la lingvan dokumentujon.

Venontjare, la 3 universitatoj de Strasburgo kunfandiĝos en unu kiu nomiĝos «eŭropa universitato de Strasburgo», kiel bele estas ke esperanto lerneblas en «eŭropa» universitato!

Komunikajo de Fabien
<http://spiral.u-strasbg.fr/>

SPIRAL

Service Pédagogique Interuniversitaire de Ressources pour l'Autoformation en Langues

Espace personnel

Bienvenue sur le nouveau site de SPIRAL

Quoi de neuf à SPIRAL ?


- **TANDEM est ouvert**
- **Semaine du 15 octobre** : début des ateliers en fonction du nombre des inscrits

Le centre de langues de SPIRAL accueille gratuitement les étudiants des universités de Strasbourg (UMB, ULP, URS) et du Rhin Supérieur (EUCOR).

A SPIRAL, vous pouvez apprendre et vous perfectionner en langues étrangères : pour compléter vos cours de langue, vous préparer à poursuivre vos études, effectuer un stage à l'étranger, construire dès maintenant votre carrière professionnelle, ou par intérêt personnel.

● Vous pouvez participer à des ateliers de conversation et d'expression, ou encore discuter avec des étudiants natifs grâce à Tandem

A compter de la rentrée 2007, SPIRAL met l'accent sur les langues modernes (moins diffusées, moins enseignées).



Intercompréhension en Langues Romanes (en ligne)

Français langue étrangère, uniquement pour les étudiants de l'UMB (hors IIEF)

- Alsacien
- Arabe
- Bulgare
- Chinois
- Danois
- Espéranto
- Grec moderne
- Hébreu
- Hongrois
- Italien
- Japonais
- Néerlandais
- Norvégien
- Persan
- Polonais
- Portugais
- Roumain
- Russe
- Serbo-Croate
- Suédois
- Slovaque
- Tchèque

spiral.crl@umb.u-strasbg.fr
SPIRAL - Le Pangloss, 22 rue Descartes, Strasbourg Tél. : 03 88 41 59 66

Universala Kongreso 2007

L'Universala Kongreso 2007 a eu lieu à Yokohama, au Japon.

Quelques mots sur le programme jeune, puisque nous sommes dans la revue de l'association Espéranto-Jeunes.

Le lieu

Il s'agissait du foyer Zaim, un espace associatif au centre de la ville, à 30 minutes à pied – hélas – du Centre de Congrès.

Tout le premier étage était réservé et occupé pour le programme Jeunes de l'UK. Au rez-de-chaussée on pouvait aller sur Internet gratuitement.

Les moments forts de ce programme Jeunes (ceux dont je me souviens 2 mois après) :

- Le premier soir, un programme nocturne autour du Centre de

Congrès, jusqu'au quai, avec vue sur le superbe panorama de la baie de Yokohama.

- Tous les soirs une activité culturelle : concerts d'Asorti (groupe lituanien), de Mayuko, de jeunes Japonais.

- Le jour de l'excursion d'une journée, 2 excursions étaient proposées : l'une d'elle au musée Ghibli (les productions de films animés de Hayao Miyazaki) et l'autre à Tokyo, dans un centre d'information sur les tremblements de terre, les incendies (pas mal du



tout, avec simulation et film en relief).

Très important au Japon, une visite du Studiopark NHK (la principale chaîne de télé japonaise), pas très intéressante pour les étrangers, à mon avis, à part un intéressant film en relief, sans lunettes spéciales cette fois.





Le soir j'ai profité de notre présence dans la capitale pour faire du lèche-vitrines et des achats dans le fameux quartier-culte de Akihabara. Le quartier de l'électronique, des otakus ... À ne surtout pas manquer à Tokyo !

- dégustations gastronomiques ;
- exposition de réponses à des questions sur la paix collectées lors de l'UK 2006 à Florence ;
- exposition générale sur l'esperanto, en japonais, pour les Japonais ;
- boutique (avec livres, méthodes en japonais, les supers T-shirts officiels, les noirs et les roses, qui se sont tous deux arrachés).

Au total, ce qui m'a le plus plu et marqué, c'était le rôle incontournable de Yayoi et de Mayuko qui se sont énormément démenées et dépensées pour assurer le succès de cette partie du Congrès.

Les autres jeunes qui ont aidé sont également à remercier, ils ont fait un très bon travail !

Je n'avais jamais vu autant de Japonais de ma vie, cela reste un des souvenirs mémorables de cette trop courte semaine au Japon.

J'ai beaucoup aimé quand les Japonais disaient «oui», ce qu'ils disent très souvent par rapport à nous, ça donne «Haj» (comme l'anglais «Hi»)

N'hésitez pas à aller au Japon dès que vous avez l'occasion !

Ne hezitu veturi al Japanio se vi havos okazon!

Aleks

Voir aussi le compte rendu dans
La Ondo de Esperanto n° 154.

<http://www.esperanto.org/Ondo/>



Sen Programa Renkontiĝo , vu par...



...Parŝo : SPR, tout un concept !

Plusieurs membres de JEFO ont participé à la Sen Programa Renkontiĝo organisée par *Kataluna Esperanto-Junularo*, *Valencia Esperanto-Junularo* et *Varsovia Vento* à Callosa d'en Sarrià (Communauté valencienne). L'idée était plutôt originale : une rencontre sans programme, mais pas sans rien à faire.

En échange du coup de pub offert par le passage d'une chaîne de télévision venue voir comment se vivait l'espéranto, les organisateurs ont obtenu la jouissance d'un petit camping gratuitement. Résultat : une cotisation minimale pour un plaisir maximal !

Rencontre autogérée

SPR, c'est un peu la rencontre autogérée : tout le monde sous la tente et des tours de cuisine. À l'arrivée, chacun s'inscrit sur

le planning pour organiser des équipes de trois. L'idée est excellente, puisque chacun tente de faire découvrir un peu de sa cuisine locale. Nombreux sont ceux qui à SPR sont repartis avec une nouvelle recette dans leurs bagages ! Bien évidemment à la fin de la semaine, nous avons eu droit à une excellente paëlla, la spécialité valencienne.

Pas de programme, donc...

Que faire, alors ? Finalement on n'a pas eu le temps de s'ennuyer, chacun pouvait proposer une activité. Des cours pour débutants ont été proposés par Irek, et Alcino nous a proposé une petite exposition sur la flore locale. Une petite randonnée a été organisée, mais le plus souvent c'est vers la rivière que se dirigeaient les participants. Les

sources de l'Algar constituent en effet un petit paradis, où l'on pouvait se rafraîchir en piquant une tête ou en se laissant glisser sous la cascade.

Le reste de la journée, parties d'échec, lecture, massages, virées à la plage ou en ville, sieste... À regretter que les organisateurs n'aient finalement pas organisé de cours de catalan.

Quoi qu'il en soit, une rencontre sans programme est une excellente idée, mais toutefois exigeante, un camping très peu cher (avec un lieu pour la cuisine) et un lieu de baignade étant obligatoires ! Évidemment, un coin ensoleillé est conseillé ! Après cette première réussite, d'autres SPR devraient avoir lieu, peut-être au Portugal ou même en Pologne.

Affaire à suivre.

... Armelle :

« Rencontre sans programme » est le thème de cette nouvelle rencontre organisée par des Catalans et inspirée par des Polonais.

Quelle drôle d'idée de passer une semaine en Espagne sans programme ! Mais l'offre est tentante et je suis descendue avec plusieurs français sous Valence, fin juillet.

Le lieu est sobre puisque nous plantons nos tentes dans le camping de Callosa d'en Sarrià à la recherche d'ombre. Il est gratuit car la télévision locale fait un reportage en direct. Youpi, ça réduit d'autant le prix (63 €).

Celui-ci comprenait les repas, délicieux et équilibrés, coordonnés par Brian. À tour de rôle

nous les avons préparés une fois (pour 50 personnes), nous avons choisi omelette-ratatouille et avons apprécié qu'il n'en reste pas malgré la quantité.


Pas de programme ne signifie pas ne rien faire. Au début, prendre 4 douches par jour pour s'acclimater au climat puis aller plonger dans la rivière proche. Puis comme c'est les vacances, faire des jeux collectifs simples et drôles, discuter, manger, faire la sieste...

Plusieurs participants ont fait du tourisme dans les environs (grottes, château, Alicante, plage). En route vers Alicante, j'ai découvert la station balnéaire Benidorm (New York plage avec des buildings). C'est l'horreur, cette ville défigurée.



Les sites de SPR :

Paršo



Heureusement nous étions dans les montagnes, entourés d'orangers et de figuiers.

Au niveau de l'espéranto, 2 représentants de chaque pays (Portugal, Pologne, Pays Bas, Italie, Russie... et Espagne, – Basques par exemple) sont allés voir le maire (le rat ! Il nous a même pas offert de l'eau à boire, mais il propose à Paù, espérantiste local d'ouvrir un cours). Des débutants ont eu des cours tous les matins et en fin de semaine nous pouvions déjà communiquer.

Bref, j'espère qu'il y aura une deuxième édition et pourquoi pas sur 2 semaines pour, en plus, se reposer !

Armelle

Seminario por esperantistigi la neesperantistan tavolon, fare de mondcivitaneco en Afriko

Post sia starigo en Benino, la neregistara organizo Afrika Centro Mondcivitana (A C M) organizis sian unuan seminarion por la neesperantistoj en Lokossa sub la temo « Esperanto kaj Mondcivitaneco ».

Ĉi tiu seminario englutis du tagojn, 12-13an de majo 2007, en Fontaine de Vie pro manko de konferenceto, kiu povas enhavi la 22 partoprenintojn (inter ili 6 estis togolandaj rifuĝintoj) en la sidejo de *Afrika Centro Mondcivitana* (A C M).

Tri famaj esperantistoj gvidadis la seminarion pri kiu la taskaro estis disdivita fare de la estraro de ACM. Zinkkpe Kodjo Benoit, la iama oficisto de Afrika Officejo (AO) transprenis la historion de esperanto helpe de François Hounsounou.

Tiu lasta kun Francis Agbenou, la nuna oficisto de AO respondecis pri eo-kurso al la partoprenintoj.

Dank'al AO pere de Raoul Hounnaké (la ĉefoficisto de AO), kiu disponigis materialon (« Cours de langue internationale esperanto ») al A C M pri la kursoj dum la seminario. Krome ACM ricevis de AO kvar poŝvortarojn por kontentigi sian membraron. La strukturo de UEA, la diversaj organoj esperantaj estas kelkfoje ekzamentaskero de ILEI. Pro tio, François H. larĝe klarigis ilin al la partoprenintoj.

Post la kurso, François H. klarigis kio estas mondcivitaneco, kiam ĝi komenciĝis, la celojn de mondcivitaneco, kiuj kongruas al tiuj de esperanto, kaj François H. emfazis, kial estas necese ligi mondcivitanecan al Esperanto uzante la disponigitajn materialojn de Gerhard Hirschmann, la Ekzekuta Direktoro AWC - Esperanto sekcio.

François H. respondis plurajn kaj tiklajn demandojn de partoprenintoj pri mondcivitaneco. Unu el ili ebligis lin konsulti la

donacitan materialon (« Manlibro de la korespondanto de mondcivitana registrolibro ») de Daniel Durand.

La vojaĝkosto de rifuĝintoj, la manĝado kaj trinkaĵo de ĉiuj partoprenintoj, fotokopiado de materialoj al ĉiuj partoprenintoj estis sub la respondecado de la estraro de A C M (ĉi memfinancis).

Gerhard Hirschmann ne fizike partoprenis la seminarion sed letere, spirite kaj voĉe ĉar li retmesaĝis al la seminario, kiu estas legita kaj telephone atingis la seminariintojn por interŝanĝi vortojn. Dankon al li pro lia subteno.

Por fini, François H. reatentigis la partoprenintojn pri la agadkampoj de la neregistara organizo Afrika Centro Mondcivitana (ACM), la alvenon de la volontulinoj en Lokossa julie kaj la Ekzekuta Direktoro, Gerhard Hirschmann aŭguste. ACM reorganigos sian duan seminarion sub la temo « *Esperanto kaj neperforto* » por permesi al ĉiuj rekte paroli kun Gerhard Hirschmann sen interpretisto/interpretanto.

La seminario bone finiĝis en bona etoso kun fotiĝo ene kaj antaŭ la sidejo de Afrika Centro Mondcivitana (A C M).

François HOUNSOUNOU

Por plia demando, bonvolu turniĝi al :

ONG Afrika Centro Mondcivitana
BP 226 Lokossa-Mono
Rêp du Bénin.
Tel : +229 95 96 51 24
Esperantoawc_benino@yahoo.fr
aŭ François HOUNSOUNOU,
Prezidanto de ONG Afrika Centro Mondcivitana



Notre dossier : Interretaĵoj

Eklaboru

«**Esperanto ne estas lingvo de komerco**». Ĉu? **Se ni estas honestaj, ankoraŭ ne... Eklaboru volas ŝanĝi tion.**

Esperantistoj estas ofte tre entreprenemaj homoj kun ege neordinaraj hobiaj kaj okupoj. Ĉefe rilate tradukadon kaj komputiladon indas serĉi spertulojn en Esperantujo.

Ĝis nun tio ĉi ne estis facila tasko. Kiel kontakti esperantistaron pri tio? Per la revuo Esperanto?

Eblas, sed certe ne estas la plej oportuna maniero. Simila problemo estas trovi volontulon, ekzemple, por la pozicio de TEJO-volontulo en UEA aŭ por redakti Esperanto-revuon.

En la retejo *eklaboru.com* entreprenistoj kaj asocioj povas doni informon, ke li aŭ ŝi serĉas kunlaboranton. Estas eblo indiki ĉu la laboro estas pagata aŭ ne, ĉu temas pri laboro per interreto aŭ ne, ktp. Esperantisto, kiu volas labori, ĉu partatempe, ĉu plentempe – ĉu pagite aŭ ne, povas alŝuti vivresumon.

Finfine ankaŭ Esperantio disponas pri profesie farita laborserĉo-retejo – ni disvastigu kaj uzu ĝin!



Amikumu

Pro tio, ke Esperanton nun oni ĉefe lernas por amikumi, ni kreis ankaŭ *Amikumu.com*. Ni konstatis, ke ne ĉiam facilas ekhavi kontaktojn kun esperantistoj, ĉu en propra regiono, ĉu kun samaj interesoj. Momente ĉefe post longa aktivado ene de la movado kaj ĉefe per renkontiĝoj, eblas ekhavi internacian amikaron. Ni volas plifaciligi la interkonatiĝon kaj plene profiti dank'al la avantaĝoj de interreto.

En Amikumu ĉiu povas krei profilon en kiu li aŭ ŝi prezentas sin. Vi povas interalie aldoni al tiu ĉi profilo pri kio vi interesiĝas kaj alŝuti fotojn. Poste eblas en Amikumu serĉi esperantistojn, ekzemple laŭ interesoj, kaj aldoni certan personon – amikon – al via konto. Tio similas al la eblocoj,

kiujn donas la retejoj *MySpace* aŭ *LiveJournal*.

Verŝajne plej interese en Amikumu estas la eblo vidi ĉiujn uzantojn sur *Google Maps*. Tiel oni povas vojaĝi ĉirkaŭ la mondo vidante kie kiu loĝas. Estas aparta paĝo, kiu montras al vi liston de uzantoj ordigitaj laŭ proksimeco de vi, do vi povas malkovri nekonatajn esperantistojn eĉ en via urbo! Ankaŭ eblas babili, diskuti en forumo, aŭskulti radion, rigardi videojn kaj ludi Skrablon.

Estas multaj planoj pliampleksigi la potencojn de Amikumu. Ekzemple ni intencas doni al vi la eblon krei grupojn (alternativon al Jahugrupoj), vikiojn, blogojn

kaj vojaĝplanojn. Sendu al ni viajn proponojn!

La teamoj de Eklaboru kaj Amikumu

Yves NEVELSTEEN, Chuck SMITH kaj Judith MEYER.

el TEJO Tutmonde





netvibes
(re)mix the web

Netvibo, remiksu la reton

Ĉu vi estas retano? Ĉu ĉiutage same kiel abelo kiu rikoltetas iom da nektaro de ĉiu el siaj preferataj floroj, vi kolektas informojn novaperintajn ĉe viaj preferataj retejoj kaj kiel abelo, vi ŝatus igi pli efika vian ĉiutagan florumadon, nu, pardonu, retumadon? Tiu ĉi artikolo estas por vi!

Kio estas abonfluo?

Vi sendube jam vidis ĉe retejo piktogramon, kiun vi eble ne jam konas, kaj pri kiu vi ofte pride-mandis vin kiel utiligi...

La plej kutime renkontata estas orangkolora kaj ŝajnas elsendi ondojn blankajn ekde punkto. Alie, vi eble jam legis en rektangulo literarojn tiajn, kiaj ATOM, RSS...


Fakte, se vi klakas sur tian butonon, vi ricevos specialan retadreson per kiu vi povos estigi

abonrilaton inter la koncerna retejo kaj alia ento. Dank al tio, bazita sur RSS-teknologio (RSS= vere simpla abonrilato), vi povas aboni la enhavon de retejo. La abono konsistas el tio, ke vi povas por unu aparta retejo abonŝuti liston laŭteman aŭ ne, en kiu afiŝiĝas ĉiuj eroj laste aldonitaj ĉe la retejo. En la listo, kiu estas ia resumo de la retejo, aperas titoloj musklakeblaj por ekiri al la ligita tuta artikolo. Kutime, se vi superflugas listeron per musmontrilo eblas legi la komencon de la teksto aŭ resumon.



Se vi klakas ĉi tie, menuo facile uzebla ebligas al vi aldoni bonligojn al via paĝo

Blokojn vi povas loki kie vi volas, kaj grupigi ĉe tema langeto



Vi povas ankaŭ gvati vian retmesaĝan konton

En bloko legeblas titoloj de laste aldonitaj eroj de retejo

Pluraj retaj servoj, tiaj kia veterprognozo disponeblas


Vi povas ĉu rekte aŭskulti, ĉu elŝuti sonŝutaĵojn por posta surstrata aŭskultado

Eblas aboni ankaŭ aŭdvidaĵojn ĉe retejoj tiaj, kiaj Youtube. En la bloko aperas lastaj videoj kiuj rilatas kun ŝlosilvorto kiun vi entajpis

Kiel legi abonfluojn?

La ento per kiu eblas legi la abonfluojn povas esti dutipa:

- povas temi pri bitvaro kiun vi havas/instalas ĉe via komputilo (fajrovulpo ekzemple kapablas trakti abonfluojn). Sed se vi agordas bitvaron ĉe propra komputilo, nur ĉe tiu ĉi lasta vi povos ĝui la konfiguron. Tio estas malavantaĝo.
- povas esti retgvatejo. Mi konsilas uzadon de retgvatejo, ĉar la granda avantaĝo estas ke de kiu ajn komputilo rete konektita, vi povos atingi vian personigitan paĝon per ensalutiloj. Vi povas personigi la retejon eĉ ĝis la aspekto (elekti fonbildo, kolorojn) kaj trovi je ĉiuj el viaj ensalutoj la aspekto agordita de vi.



Retadreso:
www.netvibes.com
<http://eo.wikipedia.org/wiki/Netvibo>

Netvibo

Ekzistas pluraj retgvatejoj, sed mi, de kelkaj monatoj uzas netvibon (kiun mi taksas vere bona). Ĝi eĉ ankaŭ disponeblas tute en esperanto. La listoj aperas en blokoj, kiujn vi povas facile reorganizi laŭvole. Vi povas grupigi la blokojn ekzemple laŭteme ĉe langeto. Langeton vi povas dediĉi ekzemple al arigo de abonfluojn en la franca, en esperanto aŭ koncerne apartan ŝattemon.

Tutan langeton eblas partumi kun geamikoj netvib-uzantaj. Tiel, ili povas ekhavi langeton, kiu rezultas el via propra selektcela laboro. Ekzemple, se vi faris interesan arigaĵon de abonfluojn en esperanto, vi facile povos diskonigi viajn selektitaĵojn al interesiguntoj per la partumeblo de netvibo.

La abonfluojn legeblaj ĉe netvibo estas ĉiaj. Estas tiuj kiuj simple arigas titolojn de novaj eroj de retejo, tiuj kiuj ebligas al vi kribri aŭdvidan enhavon per ŝlosilvortoj (ekzemple ĉe Youtube, aŭ ĉe Flickr aŭ aliaj), tiuj kiuj ebligas legi en bloko titolojn de retmesaĝoj ricevitaj ĉe via konto, ĝis tiuj kiuj

temas pri servoj (veterprognozaj, retrafikaj, eventkalendaraj), sen forgesi la eblon aboni sonsŭtatojn (Pola radio, Varsovia Vento,...). Tiujn lastajn vi povas ĉu rekte aŭskulti ĉe la retgvatejo, ĉu elŭti ilin por posta aŭskultado ekzemple per mp3-legilo, veture al via laborejo, dum vojaĝoj...

Sen trakti ĉiujn interesajn flankojn de netvibo, mi aldonas ke interesa trajto estas la tiel nomita « ekosistemo » en kiu vi trovas laŭteme, laŭlingve, laŭvivloke abonfluojn selektitajn de retanoj tiaj kiaj vi, kaj vi mem povas kontribui ekosistemon proponante abonfluojn ne jam referencigitajn.

Pli bone ol longa parolado estas memsperto. Por tio, aliĝu kaj ĝuu. Lasta atentigo, vi rapide povus adiktiĝi pri ĉiutaga uzado netvibo!

PS: Por ekuzi esperantlingvan version de netvibo, musklaku supre en la fenestro sur « Options » kaj poste « Langues ».

Fabien Tschudy

Lingva helpilo

- (abon)sonŭtado: *podcasting*
- (abon)sonŭtato: *podcast*
- abonfluo: *flux vous informant des nouveaux éléments apparus pour votre abonnement.*
- abonrilato: *syndication*
- abonŭti (abone ŭti): *télécharger par abonnement.*
- aŭdvida enhavo: *contenu audiovisuel*
- bitvaro (programaro): *logiciel*
- Il existe des logiciels par exemple qui téléchargent automatiquement sur votre ordinateur les émissions mises en ligne auxquelles vous êtes abonnés en baladodiffusion (podcasts).*
- ensalutiloj: *identifiants (mot de passe = pasvorto, identifiant= salutnomo)*
- ento: *entité*
- fajrovulpo: *Firefox*
- fonbildo: *image de fond*
- kribri: *passer au crible*
- langeto: *onglet*
- musklakebla: *cliquable*
- musmontrilo: *curseur (de souris)*
- piktogramo: *icône*
- retano: *internaute*
- retejo: *site*
- retgvatejo: *un site d'où l'ont peut épier internet*
- retmesaĝo: *courriel*
- ŝlosilvortoj: *mots clés*
- veterprognozo: *prévision météo*

Cantr II : rolludu en Esperanto!

Esperanto miragas pro ĝia kapablo troviĝi neatendite en la plej strangaj lokoj. Tion mi ekpensis, kiam mi trafis bordojn de insulo kies lokanoj parolas la Zamenhofan dialekton (tamen kun stranga loka akĉento)...

Ĉarmita de la gastemo de tiuj homoj kaj de la beleco de ilia insulo, mi decidis resti kaj ekloĝi tie. Mi ankoraŭ ne scias, ĉu tiu lando havas nomon: oni simple konas ĝin kiel la « esperanto-insulo ». Sed post ĝia beleco, mi rapide trovis ke la esperanto-insulo kaŝas danĝerojn. Ĝi estas sovaĝa lando, kie malfacilas vivi. Kelkaj el ni ne havas la feliĉon vivi longe, kaj mortas antaŭtempe pro malsato... aŭ pro ungoj. Abundas bestoj, foje danĝeraj kaj atakemaj.

Foje, sur nian plaĝon albordiĝas ŝipoj, kiuj foje estas tre imponaj kompare kun niaj barkoj. Elvenas homoj kiuj ne parolas nian lingvon. Kelkaj parolas svede, aliaj germane aŭ eĉ ali-lingve. Malfacilas komuniki kun tiuj fremduloj. Ni ĉefe uzas gestojn, vortojn, aŭ eĉ desegnaĵojn... Ili ŝajne estas pli

progresintaj ol ni, kaj uzas maŝinojn kiujn ni ne kapablas konstrui. Ili montris al ni mapojn de la mondo, kaj fingrumis al la landoj de kie ili venis. La esperanto-insulo ŝajnas ridinde eta kompare kun kelkaj aliaj. Ĝi estas peco de insularo, kiu mem estas parto de vastega mondo kies limojn ni ne konas.

Mi vidas vian sciemon. Sendube vi volas scii kie mi trovis tiun strangan insulon. Nu, mi nur sidis antaŭ mia komputilo... kaj ektrovis *Cantr II*.



Mapo de insulo en la mondo de *Cantr*, perdita meze de oceano...

Kio estas *Cantr II*?

Cantr II estas enreta rolludo. La principo de rolludoj estas sufiĉe konata: la ludantoj sidas ĉirkaŭ tablo, gvidate de ludestro, kaj rolas fantaziajn personojn, kiuj travivas aventuron. *Cantr* funkcias same, krom du ĉefaj diferencoj: la ludestron anstataŭas softvaro, kaj la ludantoj ne sekvas antaŭplanitan celon sed plene liberas interagi en nerealaj mondo. Alia grava diferenco estas, ke multegaj ludantoj povas samtempe ludi.

Cantr II apartenas al tiu kategorio de ludoj (nomitaj angle « Massively Multiplayer Online Role Game »), kiuj disfloras de la komenco de interreto, el kiuj la plej fama certe estas *Second Life*. Kelkaj el tiuj ludoj postulas ke oni elŝutu softvaron, dum aliaj plene funkcias en propra retejo. *Cantr II* estas el tiu ĉi lasta kategorio: nenio necesas por ludi krom konektiĝi per ia ajn komputilo.

La novulo, kiu ĵus kreis propran konton ĉe *Cantr II*, povas krei rolanton, kies nomon kaj sekson li elektas. Li faras ankaŭ alian gravegan elekton: la gepatran lingvon de sia rolanto. De ĉi tiu elekto dependas la loko kie aperos la rolanto en la mondo de *Cantr*. En tiu mondo kunekzistas diversaj socioj, kiuj parolas en malsamaj lingvoj, kaj havas propran teritorion.

Ĝis nun ekzistas pli ol dek kvin elekteblaj lingvoj (ĉefe: angla, pola, germana, hispana, franca, nederlanda...). Ekzemple, se vi elektis esperanton, via rolanto aperas en hazarda loko de la esperanto-teritorio. Kompreneble, li ne aperas en malplena mondo, ĉar ĝin popolumas la rolantoj de aliaj ludantoj. Tiuj rolantoj formas komunumojn organizatajn en urboj pli malpli grandaj, kun iliaj teritorioj, leĝaroj, ĉefoj kaj legendoj.

En tiu socio, vi elektu vian vojon: ne estas alia limo ol via fantazio. Vi rajtas esti politikisto kiu kandidatiĝas por la urbaj balotoj, komercisto kiu vendas siajn varojn en la apudaj urboj, maristo kiu velas ĉirkaŭ la mondo por desegni mapojn, profeto kiu iras de urbo al alia por fari disĉiplojn de sia nova religio, ŝtelisto kiu grupigas bandon por rabi la vojaĝantojn, aŭ nur ordinara kultivisto kiu prilaboras sian kampon... ĉio eblas se vi kapablas imagi tion kaj ludi konsekvence.


Kaj se vi ankoraŭ ne trovis vian vojon, oni certe bezonas viajn brakojn por la bono de la komunumo! Iom post iom, via rolanto plimaljuniĝos kaj eble ricevos pli da respondumo de sia samurbanoj. Fine, li eble havos la ŝancon esti maljunulo rigardata kun respekto de sia samlokanoj.

La scenejo de tiu socio estas la vasta mondo de *Cantr*. Al ĝi mankas preskaŭ nenio: estas maroj, herbejoj, arbaroj, montoj, ktp. kaj diversaj riĉaĵoj por espluati. Kelkaj estas krudmaterialoj por konstrui domojn kaj vojojn, aliaj por teksti vestojn, fabriki ilojn, armilojn kaj veturilojn (interalie duobla biciklo aŭbuso!) Eblas ĉasi bestojn, por protekti sin kontraŭ iliaj atakoj kaj akiri viandon kaj felon. Anstataŭ perĉasi sian manĝaĵon, eblas kultivi kaj kreskigi ĝin. Fakte, plej gravas la manĝaĵoj, ĉar ne facilas la vivo en *Cantr* kaj malsatmorto atendas tiu, kiu ne zorgas pri tio.

Kial mi ŝatas *Cantr II*

La prezentopaĝo de *Cantr II* avertas: « *atentu, multaj ludantoj spertas ke Cantr II estas tre dependiga!* » Plurmonata ludado pruvis al mi la pravecon de tiu aserto.

Tiu plezuro de la ludo unuavice fontas en la interago inter la ludantoj. Des pli riĉa ĝi estas, ju pli viva estas la ludo. La dua fonto de la plezuro ludi dependas de via impliko kiel ludanto. Vi devas imagi versimilajn rolantojn, kun propra psikologio kaj persona historio. Des pli profun-




La ĉefmenuo de *Cantr II* en esperanto

daj ili estas, ju pli interesa estas la ludo (por vi same kiel por la aliaj ludantoj). Kaj fine, estas la plezuro esplori kaj malkovri iom post iom tiun nekonatan teritorion, kiu estas la mondo de *Cantr*.

Cantr II ne estas nepre temporebema. Oni povas ludi laŭ propra ritmo, ĉu kelkajn minutojn tage, ĉu tuttage. Tio dependas de onia propra impliko en la eventoj de la ludo, kaj de la nombro de rolantoj kiujn oni kreis. Alia grava intereso de *Cantr II* estas ĝia tradukiteco en pluraj lingvoj. Jen bonega solvo por ĉiutage praktiki fremdan lingvon, sen peno kaj kun plezuro. Mi persone kreis rolantojn en ĉiuj lingvoj, kiujn mi lernis.

Bedaŭrinde, *Cantr II* ne estas sen miso. Oni povas prave juĝi la retejon malbela. La nova ludanto unue trovos ĝin konfuziga kaj la funkcibutonojn foje ne tre oportunaj. Alia problemo koncernas la esperantan tradukon, kiu estas ankoraŭ parta kaj foje stranga (iel mallerta). Tamen, ĉiuj ĉi problemetoj aspektas bagatelaj kontraŭ la vera ĝuo ludi kiun ĝi donas! Cetere, oni sciuj ke *Cantr II* estas perfekte amatora retejo, kreita de juna usonano kaj evoluigata danke al ĝiaj ludantoj, kiuj memvole tradukadas kaj pridiskutadas novajn ŝanĝojn. Mi varme konsilas al la sciemuloj viziti kaj provi ĝin: eble ili tiel komencos duan vivon.

www.cantr.net



Tiu ĉi paĝo montras informojn pri la loko kie staras la ludanto

Christophe Chazarein

Nouveau projet : une émission en balladodiffusion

Il se passe des choses en « espérantophonie ». Espérantophones nous le savons tous, mais les autres ?

S'il existe des efforts de traduction pour traduire des langues nationales (ou autres) vers l'espéranto, l'inverse n'est pas vrai, notamment concernant l'information sur les actualités espérantophones.

Évidemment, ces actualités peuvent souvent être suivies, même en français dans les revues qui sont éditées par les associations, mais les gens ne devraient pas être obligés de cotiser pour recevoir ces informations. Il ne s'agit pas forcément d'informations pratiques (comme sur les rencontres...), mais plus d'informations sur les avancées de l'espéranto...

Sur ce sujet, des articles intéressants sont souvent disponibles sur *Libera folio* par exemple, mais ils ne sont accessibles qu'aux seuls espérantophones.

Afin de faire connaître aux francophones ce qui se passe en « esperantlingvio », je propose la création d'une petite émission en français en baladodiffusion* sur les actualités générales de l'espéranto (10 minutes une fois par mois pour commencer), reprenant par exemple en substance des articles intéressants de *Libera folio* (ou autres).

